

informilo **por** interlingvistoj



Eldonas: Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj

19-a jaro (tria serio)

ISSN 1385-2191

n-ro 75 (4/2010)

Enhavo

1	Pasintaj aranĝoj.....	2
1.1	Sciencaj aranĝoj dum la 95-a Universala Kongreso en Havano.....	2
1.1.1	La 63-a sesio de la Internacia Kongresa Universitato.....	2
1.1.2	La 33-a Esperantologia Konferenco.....	2
1.2	En Bulgario pri scienco kaj tekniko.....	2
1.3	KAEST 2010: Modernaj teknologioj por Esperanto.....	3
1.4	GAL: La 40-a konferenco de la germana Societo pri Aplika Lingvistiko.....	5
1.5	GIL: la 20-a konferenco de la germana Societo pri Interlingvistiko.....	5
2	Novaj aranĝoj.....	6
2.1	Esperantologia Konferenco en Kopenhago: Proponu vian kontribuon!.....	6
2.2	Seminario pri la Literaturo de Esperanto.....	7
2.3	La 31-a Konferenco de GIL en 2011 pri faklingvoj.....	7
3	Universitataj aranĝoj.....	7
3.1	Ekonomio kaj lingvo.....	7
3.2	Sukcesaj aranĝoj en Poznań (<i>Ilona Koutny</i>).....	8
3.3	Kursoj en Stokholmo (<i>Hokan Lundberg</i>).....	8
4	Universitataj disertacioj kaj aliaj laboraĵoj.....	9
4.1	Kelkaj doktorigaj disertacioj el Sovetunio/Ruslando.....	9
4.2	Bakalaŭraj disertacioj.....	9
4.3	Disertacioj por “diplomo”, “magistro” aŭ “master”.....	10
4.4	En www.edukado.net grava rubriko pri universitataj laboraĵoj.....	12
5	Lingvopolitiko.....	12
5.1	Revuoj.....	12
5.1.1	“Language Problems & Language Planning” (LPLP), vol. 34 (2010).....	12
5.1.2	“European Journal of Language Policy” 2(2010)1.....	15
5.2	Libroj pri lingvopolitiko.....	16
6	Diversaj interlingvistikaj publikigaĵoj.....	17
6.1	Aktoj de GIL – kajero 17.....	17
6.2	Novaj verkoj pri Zamenhof.....	18
6.3	Monumenta bibliografio de periodaĵoj en aŭ pri Esperanto.....	19
7	Forpasis Jaromír Jermař (1922-2010).....	20

1 Pasintaj aranĝoj

1.1 Sciencaj aranĝoj dum la 95-a Universala Kongreso en Havano

1.1.1 La 63-a sesio de la Internacia Kongresa Universitato

Rektoro de la sesio estis *prof. Humphrey Tonkin*. Oni prezentis jenajn prelegojn:

Humphrey Tonkin	<i>Shakespeare en multlingva mondo</i>
Duncan Charters	<i>Ĉu difineblas karakterizaj trajtoj de etnaj kaj preteretnaj kulturoj?</i>
M. Rafaela Urueña Alvarez	<i>Protektado de la Medio kaj daŭripova evoluo</i>
KADOJA Hidenori	<i>Kion signifas la enkonduko de Lingvaj Rajtoj por la Esperanta movado?</i>
Jane Edwards	<i>La kultura dinamiko de la kuba diasporo</i>
Maritza Gutiérrez González	<i>Lingva diverseco en Latinameriko: defioj por daŭripova evoluo</i>
Stefan MacGill	<i>Kien la Esperanta didaktiko?</i>
Orlando E. Raola	<i>Neŭtrona difrakto: Apliko al esplorado de nanomaterialoj</i>
José Antonio Vergara	<i>Medicinaj sistemoj en interkultura dialogo: vojoj al plureco kaj tutmondiĝo.</i>

La aktoj aperis:

José Antonio Vergara (2010, red.): IKU. Internacia Kongresa Universitato. 63-a sesio. Havano, Kubo, 17 – 24 julio 2010. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 115 p.

1.1.2 La 33-a Esperantologia Konferenco

La konferencon, sub la aŭspicioj de Universala Esperanto-Asocio (UEA) kaj de Centro por Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvoproblemoj (CED) preparis kaj gvidis *prof. Christer Kiselman/Svedio*. Oni prezentis jenajn prelegojn:

Humphrey Tonkin	<i>Enkonduko</i>
Vilmos Benczik:	<i>La esperanta literaturo tra la lupeo de kelkaj lingvoteorioj kaj literaturkonceptoj</i>
Otto Prytz:	<i>Fenditaj frazoj en Esperanto</i>
Spomenka Štimec	<i>Esperanto kiel lingvo-ponto — kroata ekzemplo el la dua jarcento.</i>
Christer Kiselman	<i>Variaĵoj de esperanto iniciatitaj de Zamenhof</i>
Amri Wandel	<i>Esperanto kiel internacia lingvo en la ombro de la angla</i>

1.2 En Bulgario pri scienco kaj tekniko

De la 11-a ĝis 14-a de junio 2010 en la bulgaraj urboj Karlovo kaj Sopot okazis internacia konferenco pri la apliko de esperanto en scienco kaj tekniko. Ĝin preparis kaj gvidis la nova prezidanto de Bulgara Esperanto-Asocio, *Boĵidar Leonov*. De interlingvistika intereso estis:

Boĵidar Leonov	<i>Eblecoj por enkonduko de Esperanto kiel informlingvo en la patent-teknika informado</i>
Reinhard Fössmeier	<i>Utiligo de Vikipedio</i>

Věra Barandovská-Frank	<i>Latinidaj planlingvoj en sciencoj</i>
Valdas Banaitis	<i>Apliko de Esperanto en metaglosoterapio de skizofrenio</i>
Zlatko Hinst	<i>Certaj aspektoj de lingvaj problemoj kun ekzemploj en terminologia laboro</i>
Zbigniew Galor	<i>Esperanto kaj sociologio</i>
Ilona Koutny	<i>Esperanto kaj la angla en interkultura komunikado</i>
Nikola Uzunov	<i>Influo de la slavaj lingvoj en Esperanto</i>
Petar Todorov	<i>Historio de Bulgara E- movado</i>
Georgi Mihalkov	<i>La originala Esperanto-literaturo</i>
Vicente Paulo Werneck	<i>Aplikado de Esperanto en Religioj kaj Filozofioj</i>

1.3 KAEST 2010: Modernaj teknologioj por Esperanto

Kiel konate la mallongigo ‘KAEST’ signifas “Konferenco pri Apliko de Esperanto en Scienco kaj Tekniko”. La serio de la konferencoj havas longan tradicion. Ties radikoj troviĝas en la Esperanto-organizaĵoj ĉeĥa kaj sklovaka. Post 1990 la serion daŭrigis *d-ro Petr Chrdle* kun sia entrepreno KAVA-PECH.

Pri la historio de tiuj konferencoj legu la analizon de *Petr Chrdle* “SAEST kaj KAEST. Pri fakaplikaj aranĝoj en Ĉeĥio kaj Slovakio”, kiu aperis en la festlibro por Humphrey Tonkin “La arto labori kune” (red. Detlev Blanke kaj Ulrich Lins, Rotterdam, UEA,. 2010) p. 627 – 635.

Ekde 2010 la serion transprenis la organizaĵo E@I (= Edukado ĉe Interreto), kiun gvidas la slovako *Peter Baláž*. Ĝenerala sekretario estas la ĉeĥo *Marek Blahuš*.

E@I konsistas aparte el junaj esperantistoj, kiuj tre bone orientiĝas pri la modernaj elektronikaj teknikiloj kaj virtuoze scias utiligi la reton por Esperanto.

La ĉi-jaran konferencon, 18.-21.11.2010, en la slovaka urbeto Modra-Harmónia, unuan fojon organizis ĝuste tiu grupo kaj donis al ĝi sian specifan modernan stampon.

Jam antaŭ la komenco de la konferenco oni trovis abundan materialon en la reto (i.a. teknikaj informoj, programo, listo de aliĝintoj :

<http://www.ikso.net/kaest/pmwiki/pmwiki.php?n=Main.HomePage>

Tie oni nun trovas fotojn kaj eĥojn pri la tre sukcesa konferenco, kiun partoprenis 52 personoj el 15 landoj.

Por prezenti la specifan karakteron de la konferenco ni publikigas la temojn de ĉiuj prezentitaj prelegoj (pli malpli laŭ la sinsekvo de la prezento, kvankam ili ofte okazis paralele):

Ján Vajs	<i>Scienco praktike (du prelegoj pri speleologio)</i>
Petr Chrdle	<i>Du gravaj serioj de Sciencteknikaj aranĝoj en Meza Eŭropo (SAEST kaj KAEST)</i>
Peter Baláž, Marek Blahuš kaj Jevgenij Gaus	<i>E@I – ĝia vojo en la Esperanto-movado</i>
Eckhard Bick	<i>WikiTrans, la Angla Vikipedio en Esperanto</i>
Pavla Dvořakova	<i>Esperanto-retejoj</i>
Ilona Koutny	<i>Esperanto en komputa lingvistiko – retrorigardo</i>
Wera Blanke	<i>Publike paroli - kelkaj praktikaj aspektoj</i>
Sonja Petrović-Lundberg	<i>Paralela korpuso de Esperanto</i>
Stano Marček	<i>Kuracaj plantoj</i>
Stefan Panka	<i>Lexicon silvestre en nova aspekto - Vikipedia projekto (germanlingva prelego, interpretis esperanten Detlev Blanke)</i>

Jan Niemann	<i>Innotrans - spertoj el la plej grava fervoj-foiro de Eŭropo</i>
Jacob Nordfalk kaj Hèctor Alòs i Font	<i>Apertium kaj Esperanto. Maŝintradukado en kaj el Esperanto per malfermkoda platformo</i>
Zbigniew Galor	<i>Sociologia esploro de la Esperanto-movado</i>
Jacob Nordfalk kaj Hèctor Alòs i Font	<i>Apertium kaj Esperanto - la funkcimaniere kaj kiel vi povas mem partopreni</i>
Detlev Blanke	<i>Interlingvistika agado sur landa nivelo - spertoj de la germana Societo pri Interlingvistiko</i>
Toon Witkam	<i>ESPSOF - videbligi morfemstrukturon surekrane</i>
Bart Demeyere	<i>ViVo (Vikia Vortaro)</i>
Francesco Maurelli	<i>Memregaj aŭtomobiloj</i>
Eckard Bick	<i>DeepDict, Reta Vortaro de vera lingvouzo</i>
Detlev Blanke	<i>Festlibroj - nova fakliteratura ĝenro en Esperanto - kun aparta konsidero pri la festlibro por Humphrey Tonkin</i>
Marcos Cramer	<i>Komputlingvosciencia kaj logika analizado de matematikaj tekstoj</i>
Johannes Müller	<i>Hardigi metalajn materialojn per hejttraktado</i>
Konstantin Hlyzov	<i>Perkomputila tekstokompreno: ĉu pli facile en Esperanto? (teleprelego per Skajpo)</i>
Barbara Pietrzak	<i>Pola Radio en Esperanto</i>
Seán Healy	<i>Semantika Interlingvo</i>
Iván Bujdosó	<i>Statistika pruvo pri kongruenco inter parola kaj skriba KER-ekzamenoj</i>
Mélanie Maradan	<i>Terminologiaj registraĵoj</i>
Stano Marček	<i>Sonlibroj en Esperanto</i>
Katarína Nosková	<i>Valenta modelo de verbo el kontrasta vidpunkto en la slovaka, germana kaj Esperanto</i>
Jacob Nordfalk	<i>Poŝtelefonoj kaj Esperanto</i>
Toon Witkam	<i>Sciencfikcio kaj Robotoj</i>
Marek Blahuš	<i>Literumkontrolilo por Esperanto</i>
Sonja Petrović-Lundberg	<i>Lingvohelpilo por Esperanto</i>
Konstantin Obraztsov	<i>Fiask-sekureco en elektromekanikaj sistemoj</i>
Toon Witkam	<i>GugloKVEK - por vidi veran vortuzon hodiaŭ en la reto</i>

Krom la prelegoj okazis vikipedio-seminario, kiun gvidis *Pavla Dvořakova* kaj *Marek Blahuš*. Alian seminarion kun la titolo ‘komputila ateliero’ gvidis *Jacob Nordfalk*. Krom tio oni seminariis pri komputilingvistiko. Estis multaj eblecoj por spertinterŝanĝo kaj utilaj kontaktoj.

Krome okazis ISAE-kunsido, kiun gvidis *Francesco Maurelli* kaj partoprenis per Skajpo *José Antonio Vergara*.

La organizantoj planas eldoni la prelegojn en aparta volumo. La sekva KAEST estas antaŭvidata por 2012

1.4 GAL: La 40-a konferenco de la germana Societo pri Aplika Lingvistiko

La 40-a konferenco de la germana profesia lingvosciencia societo „Gesellschaft für Angewandte Linguistik e.V.“ (GAL, Societo pri Aplika Lingvistiko) de la 15.-17. septembro 2010 okazis en la Universitato de Leipzig. En plenkunsidoj, sekcioj kaj temgrupoj oni traktis la kadran temon „Lingvaj regionoj“. La sekcion 10 kun la kadra temo „Traduka kaj interpreta scienco“ gvidis *Prof. Dr. habil. Klaus Schubert*, Universitato Hildesheim.

La temgrupon II pri „La lingva regiono Eŭropo“ gvidis la profesorinoj *Ines Busch-Lauer* (Zwickau) kaj *Sabine Fiedler* (Leipzig). Inter la diversaj prelegoj en tiu parto de la konferenco, kiun aŭskultis pli ol 50 profesiaj lingvistoj, krom la enkonduko de *Sabine Fiedler*, estis la jena:

Detlev Blanke (Berlin) *Pri la demando de planlingvo en la Eŭropa regiono*

La resumoj de la 169 prelegoj aperis:

Elisabeth Burr/Elena Potapenko (2010, red.): *40. Jahrestagung der Gesellschaft für angewandte Linguistik. „Sprachräume“*. Leipzig, 15.-17.09.2010. Abstracts, 262 p.

1.5 GIL: La 20-a konferenco de la germana Societo pri Interlingvistiko

La 20-a konferenco de la germana scienca societo Gesellschaft für Interlinguistik e.V. (Societo pri Interlingvistiko), kvazaŭ jubilea aranĝo, okazis de la 26-a ĝis 28-a de novembro en Berlin. La ĉeftemo de la konferenco estis „Lingvo-inventado kaj ties celoj“. 40 personoj, inter ili konsiderinde multaj junuloj, aŭskultis jenajn germanlingvajn prelegojn:

Madis Linnamägi (Estonia Interlingvistika Societo, Tartu/Estonio)
Johannes Aavik (1880-1973) kaj la lingvorenovigo en Estonio

Sebastian Kirf (Faka Altlernejo Emden/Leer)
Ebloj kaj limoj de planlingvo por la akcelado de sociala kohezio

Sabine Fiedler (Universitato Leipzig)
„The Secret Vice“ – anglaj aŭtoroj kaj iliaj fikciaj lingvoj (Swift, Orwell, Tolkien)

Heiner Eichner (Universitato Vieno/Aŭstrio)
La artefarita lingvo de Hildegardis von Bingen: koncepto kaj celo

Věra Barandovská-Frank (Universitato Paderborn)
Lingvokreado kaj mikronaciismo: La ekzemplo El Glheth Talossán

Claus Killing-Günkel (Köln)
Cliiuy – kiel mi inventis lingvon

Marek Blahuš, (Brno, Masaryk-Universitato, Ĉeĥio)
Toki Pona: minimalisma planlingvo

Wim Jansen (Universitato Amsterdam/Nederlando)
La gramatika travidebleco en Esperanto
Katarína Nosková (Holič/Slovakio)
Valenta modelo de verbo laŭ kontratsa aspekto en la lingvoj germana, slovakaj kaj Esperanto

Toon Witkam (Utrecht/Nederlando)
Konkordancoj por Esperanto-vortoj nun ankaŭ eblaj en la reto

Cornelia Mannewitz (Universitato Greifswald)
SAT – Esperanto-Organizaĵo en la politikaj konfliktoj de sia tempo

James McElvenny (Universitato Sidney/Aŭstralio, portempe en Leipzig)
La teorio de Ogdens pri semiotiko kaj ĝia apliko en Basic English

Zsófia Kóródy (Herzberg/Harcmontaro)
Pri la biblioteko kaj arkivo de la Interkultura Centro Herzberg

Seán Ó Riain (Eŭropa Komisiono, Bruselo)
La civitana platformo por multlingvismo –ĉu ŝanco por pli da lingva justeco?

Detlev Blanke (GIL, Berlin)
20 jarojn Gesellschaft für Interlinguistik e.V. – rezultoj kaj problemoj

En sia prelego *Detlev Blanke*, la prezidanto de GIL ekde 1991, prezentis bilancon de la 20-jara organizaĵo kaj proponis multajn diskutindajn temojn, kiuj povus gravi por la estonteco de GIL. La prelego montris, ke GIL fartas bone.

Tamen, post 20 jaroj da prezidado, Blanke ne rekandidatiĝos kaj proponis por 2011 elekton de nova estraro. Ankaŭ estonte, kompreneble, li laboros por GIL kaj i.a. plue redaktos la germanlingvan bultenon “Interlinguistische Informationen” (Interlingvistikaj Informoj).

Kiel jam kutime *Sebastian Kirf* kun *Peter Nölle* registris la prelegojn sur DVD (mendu ĉe ePost@kirf.de). *Johann Pachter* prezentis riĉan librotablon kaj *Detlev Blanke* ekspoziciis el sia privata arkivo novajn fakmaterialojn.

2 Novaj aranĝoj

2.1 Esperantologia Konferenco en Kopenhago: Proponu vian kontribuon!

Ankaŭ en la 96-a UK en Kopenhago okazos la tradicia Esperantologia Konferenco. Ĝin organizas Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED). Ĝi estis unuafoje en la programo de la UK en Varno en 1978. En Kopenhago okazos jam ĝia 34-a sesio.

La Konferenco celas doni eblon prezenti rezultojn de novaj esperantologiaj esploroj kaj ebligi spertinterŝanĝon kun aliaj esperantologoj. Same kiel la prelegoj de pluraj antaŭaj sesioj, ankaŭ tiuj en Kopenhago estos poste eldonitaj kiel aktoj. Interesatoj por prelegi sendu resumon de la proponata prelego kun mallonga biografieto pri si al *Detlev Blanke*, detlev@blanke-info.de, ĝis la 31-a de januaro 2011.

La prelegoj de la Esperantologia Konferenco en Havano estas videblaj en la Reta Kinejo de UEA ĉe <http://www.ipernity.com/home/97850>.

(Laŭ gazeta informo de UEA)

2.2 Seminario pri la Literaturo de Esperanto

Venu al la Universitato de Louisville, Louisville, Kentucky (Usono), por partopreni en unika Seminario pri la Literaturo de Esperanto!

Kiam: sabato-dimanĉo, 26-27 februaro 2011

Sub gvido de:

Ulrich Becker, poeto kaj eldonisto
Duncan Charters, lingvisto
Humphrey Tonkin, kritikisto
Tim Westover, novelisto

Tempogamo:

La seminario komenciĝos matene la 26-an de februaro kaj finiĝos tagmeze la 27-an de februaro. Ĝi parte koincidos kun la 39-a Konferenco pri Literaturo kaj Kulturo depost la Jaro 1900, organizita de la Universitato (<http://www.thelouisvilleconference.com/>), kaj al kiu oni rajtas aliĝi kiel vizitanto kontraŭ \$10 tage.

Loko: Salonoj de la Universitato de Louisville.

Lingvoj: La lingvoj de la seminario estos Esperanto kaj la angla.

Tranoktado: Pri hoteloj vidu la retpaĝaron de la konferenco (adreso ĉi-supre).

Aliĝo: \$35 (\$15 por studentoj). Bonvolu anonci vian deziron partopreni ĉe la organizantoj: bonnie.fonsecagreber@louisville.edu
tonkin@hartford.edu aŭ chez.grebeli@gmail.com

2.3 La 21-a Konferenco de GIL en 2011 pri faklingvoj

La 21-a konferenco de Gesellschaft für Interlinguistik (GIL, Societo pri Interlingvistiko) okazos de 18-a ĝis 20-a de novembro 2011 en Berlin. La konferenca lingvo kiel kutime estos la germana. La ĉeftemo de la konferenco estos “Faklingvo kaj lingvo-planado”. Kontakto: gil@blanke-info.de

3 Universitataj aranĝoj

3.1 Ekonomio kaj lingvo

La profesoro pri ekonomiko ĉe Humboldt-Universitato de Berlin, *Bengt-Arne Wickström*, kune kun *prof. Jürgen van Buer*, dum la vintraj semestroj de 2006-2010 okazigis seminariojn kun la kadra temo “Ekonomio kaj lingvo”. La studentoj devis prezenti eseojn pri diversaj aspektoj de la kadra temo. Kelkaj eseoj estas tute interesaj kaj invitas al plua studado. La plej multaj eseoj estas verkitaj en la germana, kelkaj en la angla.

La eseoj kiel pdf-dosieroj estas storitaj sub:

<http://lehre.wiwi.huberlin.de/Professuren/vwl/fw/Dissertationen>

[%2C Theses und Seminararbeiten/Seminararbeiten/Oekonomie und Sprache.](#)

Dum la vintra semestro 2010/2011 prof. Wikström denove okazigas la seminarion.

Kontakto: wickstr@wiwi.hu-berlin.de

3.2 Sukcesaj interlingvistika sesio kaj instruista trejnado en Poznań

Se vi ne nur deziras, ke Esperanto estu instruata en diversaj lernejoj, sed vi mem volas ankaŭ instrui, tiam finfaru la *unuĵaran instruistan trejnadon* de UAM kaj ILEI kunlabore kun Edukado.net! La kursaro jam la trian fojon akompanas la tradiciajn interlingvistikajn sesiojn en la Universitato Adam Mickiewicz, en Poznano (Pollando).

La du surlokaj unusemajnaj sesioj (septembre kaj februare) disponigas koncize la necesajn metodikajn konojn por profesie instrui Esperanton. Post hejma kaj reta laboro la sukcesa trapaso de la fina kompleksa ekzameno kun prezento de finlaboraĵo rajtigas al la instruista diplomo de ILEI post unu jaro. La defion alfrontis ĉi-foje 11 personoj (po 3 el Pollando kaj Hungario, 2 el Francio, po unu el Slovakio, Belgio kaj Germanio).

ILEI kun UEA disponigis 4 stipendiojn kiel en la pasinta jaro. Al la alvoko de la prezidanto de ILEI, *Stefan MacGill* al la landaj asocioj kaj landaj ILEI-sekcioj reagis nur PEA stipendianto du polajn gejunulojn. La motoro kaj gvidanto de la trejnado, *Katalin Kováts* allogis la atenton de la partoprenantoj ĝis la lasta momento per verva prezento de instrumetodoj, instrufaktoroj disponigante amason da lernmaterialoj kaj trejnante la kursanojn pri la uzo de la nove lanĉota retejo www.edukado.net.

Ilona Koutny, gvidanto de la Interlingvistikaj Studoj, traktis tiklajn terenojn de Esperanto-gramatiko kaj instruadon de fonetiko, gramatiko kaj vortoprovizo. La aktualaj kursoj de la *Interlingvistikaj Studoj* kompletigis la studprogramon: *István Ertl* skizis panoramon de la nuntempa Esperanto-literaturo. La partoprenantoj povis flari ankaŭ la unuafoje realiĝantan kurson pri tradukado – specialiĝon en la tria jaro de la interlingvistika programo: *Kristin Tytgat*, el la Brusela Universitato, enkondukis la interesiĝantojn en la sekretojn de interpretado kaj tradukado, *István Ertl* en beletran tradukadon.

Samtempe el la pasintjara grupo du partoprenantoj – *Katarína Nosková* el Slovakio kaj *Xose Conde* el Katalunio prezentis sian finlaboraĵon kaj sukcese trapasis la finan ekzamenon, dume la alia sepopo planas same fari dum la februara sesio.

La merkreda komuna vespero kaj semajnfine la kulturaj programoj de *Arkones* ofertis amuziĝon al la persistaj kursanoj. La kursanoj trovis la semajnon riĉa je programoj kaj informoj, sekvas nun la plenumo de taskoj kaj metieja kunlaboro pere de la interna diskutlisto. Pripensu la partoprenon en la nova universitata grupo post unu jaro!

Ilona Koutny

3.3 Kursoj en Stokholmo

Ĉi-semestre (2010) okazis du Esperanto-rilataj kursoj en la universitato de Stokholmo/Svedio, ambaŭ distancaj (sen fizikaj renkontiĝoj):

- "Enkonduko al Esperanto" (7,5 poentoj)

- "Interlingvistiko kaj konstruitaj lingvoj" (7,5 poentoj)

Al la enkonduka kurso aliĝis 27 homoj. Ĉiusemajne la studentoj trairis kursojn ĉe www.lernu.net Ankaŭ okazis parolekzercoj per Skajpo, sed pro teknikaj problemoj ili ne estis tre sukcesaj. Montriĝis ke kiam pli ol 8 personoj provas interparoli per tiu programo okazas blokiĝoj, neintencaj elsalutoj ktp. Do, praktike estis preskaŭ neeble havi parolekzercojn per Skajpo. Ĉu iu scias pri simila, sed pli taŭga programo por grandaj grupoj?

En la kurso pri interlingvistiko partoprenas kvin personoj.

Venontsemestre (septembro – januaro 2011) okazos laŭplane du daŭrigaj Esperanto-kursoj: "Profundiĝo en Esperanto" (11 poentoj) kaj "Movado kaj literaturo" (4 poentoj).

Hokan Lundberg

4 Universitataj disertacioj kaj aliaj laboraĵoj

4.1 Kelkaj doktorigaj disertacioj el Sovetunio/Ruslando

Lukjanec Dina Grigorjevna: "Лингвистический анализ выразительных средств поэтической речи". На материале эсперанто и французского языков. Автореферат диссертации на соискание учёной степени кандидата филологических наук. 1983. (Lingvosciencia analizo de la esprimiloj en lingvo de poezio, sur la bazo de Esperanto kaj de la franca lingvo. Aŭtora referaĵo pri la disertacio¹ por ricevi la gradon de kandidato de filologia scienco²). Moskva: Akademio de Sciencoj de USSR, Lingvistika Instituto, temgvidanto de la disertacio: Magomet I. Isaev, amplekso de la disertacio 200 p. (Aŭtora referaĵo 20 p.).

Mjasnikov Leonid Nikolaevič: "Принципы становления и развития фразеологии в эсперанто и в этнических языках (английском, венгерском, немецком, русском и французском)". Автореферат диссертации на соискание степени кандидата филологических наук. 1989. (Principoj de la apero kaj evoluo de frazeologio en Esperanto kaj en etnaj lingvoj [angla, hungara, germana, rusa, franca. Aŭtora referaĵo pri la disertacio por ricevi la gradon de kandidato de filologia scienco). Moskva: Akademio de Sciencoj de USSR, Lingvistika Instituto, temgvidanto de la disertacio: Magomet I. Isaev, (Aŭtora referaĵo 21p.).

Dmitrijevskaĵa-Nilsson Julija Anatol'evna: "Международное эсперанто-движение как субъект международной коммуникации". Автореферат диссертации на соискание учёной степени кандидата культурологических наук. 2000 г. (La internacia Esperantomovado kiel subjekto de internacia komunikado. Aŭtora referaĵo pri la disertacio por ricevi la gradon de kandidato de kultursciencoj). Sankt-Petersburg: Humanisma Universitato de Sindikatoj, katedro pri socio-kultura teknologio. Temgvidanto: A. P. Markov (Aŭtora referaĵo: 24 p.).

Jelbajeva Darima Valer'evna: "Звуковой и грамматический строй бурятского и эсперанто языков". Автореферат диссертации на соискание учёной степени кандидата филологических наук. 2000 г. (Fonologia kaj gramatika strukturo de la lingvoj burjata kaj Esperanto. Aŭtora referaĵo pri la disertacio por ricevi la gradon de kandidato de filologia scienco.) Ulan-Ude: Burjata Ŝtata Universitato, katedro pri la rusa-burjata filologio. Temgvidanto: V.I.Zolchoev (Aŭtora referaĵo: 26 p.).

(Rimarko:

La amplekso de le menciitaj disertacioj plej ofte estas nekonata. La disertacioj kutime ne estas publikigataj kaj troviĝas nur en la arkivoj de la universitatoj. Mi dankas al Anatoli Sidorov, St.-Petersburg pro la informoj- DB).

4.2 Bakalaŭraj disertacioj

La gradon de bakalaŭro oni akiras ĝenerale post 3-jara studado (6 semestroj).

¹ La „Aŭtora referaĵo“ estas komparebla kun la defendendaj tezoj, kiel ofte kutime en eŭropaj universitatoj

² Ĉi-tiu titolo ekvivalentas al la mezeŭropa doktoro, resp. la angla PhD.

Fleur, Manon (2010): English and Esperanto: two languages for international communication. Bachelor thesis English language and culture. Amsterdam. Universitato, 33 p. (Pliaj informoj mankas en la manuskripto).

Markarian, Nikola (1997): Contre la Tour de Babel: quel avenir pour l'espéranto dans la France et dans l'Union Européenne ? BSc-disertacio por « French and European Studies ». Surrey : University of Surrey, Department of Linguistics and International Studies. Temgvidantoj: Prof. Anne Judge kaj Dr. Dawn Marley, 86 p.

Nosková, Katarína (2009): Valenzmodell des Verbs aus kontrastiver Sicht in der deutschen, der slowakischen Sprache und im Esperanto (Valenta modelo de verbo laŭ kontrasta aspekto en la lingvoj germana, slovaka kaj Esperanto). Trnava: Universitato Sv. Cyrila Metodi, Filozofia Fakultato, katedro por germanistiko. Temgvidanto: prof. doc. PhDr. Ružena Kozmová, CSc., 207 p.

4.3 Disertacioj por “diplomo”, “magistro” aŭ “master”

La supraj studofinaj gradoj en la eŭropaj universitatoj havas pli malpli la saman valoron. Ĝenerale oni akiras ilin post 5-jara studado (10 semestroj)

Bublak, Natalija (2004): Vasilij Eroshenkos Jahre in Japan: Seine Mitwirkung in der japanischen Esperanto – Bewegung und seine literarischen Tätigkeiten in Japan. (La jaroj de Vasilij Eroŝenko en Japanio: Lia kunagado en la japana Esperanto-movado kaj lia literatura laboro en Japanio). Magistra disertacio por la fako japanologio de la filozofia fakultato por kultursciencoj ĉe la Ludwig-Maximilian-Universitato München. Temgvidantoj: prof. dr. Evelyn Schulz, prof. dr. Johanna Renate Doring-Smirnov. (amplekso?)

Votýpková, Eliška (2010): Esperanto v Československu v letech 1945 – 1970. (Esperanto en ĈSSR 1945-1970). Prag: Karol- Universitato, filozofia fakultato, katedro por politologio. Diplomalaboraĵo, Temgvianto: PhDr. Oldřich Tůma, PhD, 134 p. + 21 p.

Velitschkova, Ana (2010): Cosmopolitan priming for change: Transnational social movements in communist Eastern Europe. Flanner Hall/Indiana: University of Notre Dame, Graduate Program in Sociology. Temgvidanto: Jackie Smith, Master-disertacio (Master of Arts), 66 p.

Maradan, Mélanie (2010): Terminologie des Doppler-Effekts. Deutsch-Englisch-Spanisch-Esperanto-Französisch / Terminology of the Doppler Effect. German-English-Spanish-Esperanto-French / Terminología del efecto Doppler, alemán-inglés-español-esperanto-francés / Terminologio de la Doplera efiko, germane-angle-hispane-esperante-france / Terminologie de l'effet Doppler, allemand-anglais-espagnol-espéranto-français. Mémoire présenté à l'École de traduction et d'interprétation pour l'obtention du Master en traduction, mention terminologie. Genève: Université de Genève. Temgvidanto: Prof. Bruno de Bessé, 224 p.

Resumo:

Tiu laboraĵo prezentas la terminologion de la Doplera efiko (germane-angle-hispane-esperante-france) kaj enhavas ĉefe la sekvantajn konceptarojn: tipoj de Dopleraj efikoj, ondoj, fontoj kaj celoj, medioj, rapidoj, kaj sistemo de referenco. Temas pri diplomalaboraĵo prezentita en la Altlernejo pri Tradukado kaj Interpretado (ETI) de la Universitato de Ĝenevo. La verketo enhavas 70 kvinlingvajn registraĵojn por tradukistoj, kiuj ne havas fakajn sciojn pri fiziko. Ĉiu

koncepto troviĝas sur duobla paĝo. Indeksoj je la fino enhavas ĉiujn terminojn kaj ebligas serĉadon.

Kirf, Sebastian (2010): Möglichkeiten und Grenzen einer Plansprache zur Förderung Sozialer Kohäsion (Ebuloj kaj limoj de planlingvo por la akcelado de sociala kohezio). Master-disertacio, Emden/Leer: Faka Altlernejo Emden/Leer, 203 p., Temgvidantoj: prof. dr. Sylke Bartmann, pd. dr. dr. Rudolf Fischer, (Kontakto: ePost@Kirf.de)

Shevchenko, Dimitrij (2010): Периодические издания на языке эсперанто как средство международной массовой коммуникации (история и проблемы развития 1889-2010, тематические направления, перспективы) (Periodaĵoj en Esperanto kiel rimedoj de internacia amasa komunikado. Historio kaj problemoj de la evoluo 1889-2010). Magistra disertacio. Moskva: Российский Университет Дружбы Народов (Rusa Universitato de la Popola Amikeco, filologia fakultato, katedro por amasa komunikado, fako ĵurnalismo). Temgvidanto: T. N. Ivanova, 70 p.

Giuseppe Macrì (2010): L'esperanto da Zamenhof al Terzo Millennio. Lingua, letteratura, ideologia. Laurea Specialistica in Lingue e Letterature Europee ed Americane (Magistriĝo pri Lingvoj kaj Literaturoj Eŭropaj kaj Amerikaj, Fakultato lettere (literaturo). Cattedra Storia e Geografia Linguistica dell'Europa (Historio kaj Lingva Geografio de Eŭropo). Roma: Università di Tor Vergata - Seconda Università di Roma, Fakultato pri literaturo, temgvidanto: Prof. Antonio Filippin 160 p.

(La disertacio aperis kiel libro:

Giuseppe Macrì (2010): *Di esperanto in esperanto - Storia del sogno di una lingua per tutto il mondo*. Guidonia: Aletti editore. Paĝoj 126.[Guidonia estas urbeto apud Romo] 126 p., ISBN: 978-88-6498-309-7.

Osipova, Arina (2010). Mankas originallingvaj bibliografiaj informoj. Pri la laboraĵo oni legis informon en "Starto 2/2010". Krome helpe de *Anatolo Sidorov* ni ricevis jenan tekston:

Nova diplomverko pri Esperanto:

La 31-an de majo 2010 en la urbo Jekaterinburg, Rusio, la juna studentino *Arina Osipova* diplomiĝis pri la temo "Propedeŭtika rolo de Esperanto en la lernado de la germana lingvo". Ŝi studis en la Urala ŝtata pedagogia universitato (UŜPU), instituto de fremdaj lingvoj. Arina preskaŭ ne diskonigis informon pri la temo de sia diplomverko, tial nur hazarde oni povis informiĝi pri la bonega fakto.

Kiel Osipova mem rakontis, jam profesia instruistino de la germana, ŝi lernis Esperanton antaŭ kvar jaroj, kaj kiam venis tempo elekti temon de diplomverko, ŝi decidis kunigi Esperanton kaj la studadon. Arina multe interesiĝas ĝuste pri propedeŭtiko, tial komence ŝi volis pristudi nur ĝin – kiel Esperanto ĝenerale helpas lerni lingvojn, ne iun konkretan. Sed la dekanino de ŝia fakultato estis ege kontraŭ Esperanto ("En la mondo estas tro da problemoj pri la normalaj lingvoj, kaj vi alŝovas la artefaritan!" – citaĵo). Do laŭ la dekanino oni povas okupiĝi pri Esperanto nur hobi-nivele, sed ne scienc-cele. Tial baza problemo estis trovi sciencan gvidanton de la diplomverko – pedagogoj en UŜPU jen timis la temon ĉar nenion sciis, jen ne vidis sencon okupiĝi pri tio. Klariĝis ankaŭ, ke inter la lingvistoj ekzistas opinio, ke propedeŭtika rolo de Esperanto estas memevidenta kaj oni ne devas ion ajn pruvi ĉi-rilate. Krome laŭ ili ne necesas enkonduki Esperanton en altlernejojn kiel devigan studobjekton, ĉar la latino tute bone plenumas la rolon de Esperanto.

Post la diplomiĝo Arina ankaŭ intencintus fariĝi aspiranto, sed kun ĉi tiu temo la afero estas malreala – oni ne lasos ŝin doktoriĝi ĉi-prie. Ŝi diris, ke antaŭ jardeko iu en UŜPU provis

skribi sciancan verkon pri Esperanto, sed malsukcese. Arina ricevis kiel gvidanto instruistino de la franca, kiu iam lernis Esperanton, sed rilatas al ĝi ne serioze. Krome ŝi ne regas la germanan (pri kiu ĉefe temas en la verko de Arina). Tial Osipova devis fakte labori memstare, la gvidantino helpis nur pri stilaj nuancoj kaj organizaj aferoj. Arina laboris dum du jaroj. Pasintjare ŝi analizis la Esperanto-rusan vortaron de *Aleksandro Ŝevĉenko*, kaj krome uzis etimologian vortaron de Esperanto – ŝi serĉadis germanajn radikojn en Esperanto-vortoj. Osipova faris jenan eksperimenton: ŝi proponis al 22 esperantistoj kun malsama Esperanto-lingvokono kaj nenioma rego de la germana traduki el la germana apartajn vortojn, apartajn frazojn kaj malgrandan tekston. Por la tuta traduko ŝi liveris al eksperimentatoj 45 minutojn. Rezulte de la traduka laboro evidentiĝis, ke la hipotezo pri la propedeŭtika valoro estis plene konfirmita kaj la celo – atingita. Osipova ricevis plej altan poenton, la recenzo estis pozitiva kaj sen korektoj aŭ rimarkoj. La atesta komisiono ĝenerale rilatis neŭtrale, sed faris bazajn demandojn – kial Esperanto sed ne la angla, ĉu Esperanto helpis lerni la germanan, ĉu Esperanto estas ie lernata kiel studobjekto. Krome oni petis ke Arina diru ion en Esperanto – ŝi citis la unuajn kvar versojn de zamenhofa "La Espero"...

Grigorij Arosev

4.4 En www.edukado.net grava rubriko pri universitataj laboraĵoj

La grava reta paĝaro www.edukado.net, kiun gvidas Katalin Kovats, estas funde reorganizita kaj modernigita. La paĝaro enhavas multege da valoraj materialoj por la celo de la instruisto. Krome tie troviĝas rubriko, en kiu oni registras universitatajn laboraĵojn: <http://www.edukado.net/biblioteko/diplomlaboraĵoj>.

5 Lingvopolitiko

5.1 Revuoj

5.1.1 “Language Problems & Language Planning” (LPLP), vol. 34 (2010)

LPLP 1/2010

Articles / Artículos / Aufsätze / Artikoloj

Vernacularization, globalization, and language economics in non-English-speaking countries in Africa

Nkonko M. Kamwangamalu

Language planning and language-in-education policy in Iran

A. Majid Hayati and Amir Mashhadi

Hangovers of globalization: A case study of laissez-faire language policy in Denmark

Maarja Siiner

Interlinguistics / Interlingüística / Interlinguistik / Interlingvistiko

How European is Esperanto? A typological study

Mikael Parkvall

Reviews / Críticas / Rezensionen / Recenzoj

Jennifer Jenkins. English as a Lingua Franca: Attitude and Identity
Reviewed by Federico Gobbo

Garland D. Bills and Neddy A. Vigil. The Spanish Language of New Mexico and Southern Colorado: A Linguistic Atlas
Reviewed by Frank Nuessel

Claude Truchot. Europe: l'enjeu linguistique
Reviewed by Bonnie Fonseca-Greber

Jenny Carl and Patrick Stevenson, ed. Language, Discourse and Identity in Central Europe. The German Language in a Multilingual Space
Crítica per Tazio Carlevaro

Timothy Reagan. Language Matters: Reflections on Educational Linguistics
Reviewed by Frank Nuessel

LPLP 2/2010

Articles / Artículos / Aufsätze / Artikoloj

Language liaisons: Language planning leadership in health care
Chris Allen Thomas and Brett Lee

Language planning in action: Searching for a viable bidialectal program
Andreas Papapavlou

The effects of language planning initiatives on the language attitudes and language practices of university students: A comparative study of Irish and Basque
Máiréad Moriarty

Swedish television as a mechanism for language planning and policy
Francis M. Hult

Interlinguistics / Interlingüística / Interlinguistik / Interlingvistiko

L. L. Zamenhof and the shadow people
Esther Schor

Reviews / Críticas / Rezensionen / Recenzoj

Farzad Sharifian and Michael Clyne (eds.). Australian Journal of Applied Linguistics, Special Forum Issue: International Forum on English as an International Language, 31/3. 2008
Reviewed by Timothy Reagan

Bernard Spolsky. Language Management
Reviewed by Ulrich Ammon

LPLP 3/2010

Articles / Artículos / Aufsätze / Artikoloj

The English-as-a-lingua-franca approach: Linguistic fair play?
Sabine Fiedler

Variability in naming: Database challenges in multicultural and multilingual settings
Heather McCallum-Bayliss and Carolyn Temple Adger

Chinese education in Singapore: Constraints of bilingual policy from the perspectives of status and prestige planning
Shouhui Zhao and Yongbing Liu

Interlinguistics / Interlingüística / Interlinguistik / Interlingvistiko

Recontextualizing Lakshmiswar Sinha
Probal Dasgupta

Reviews / Críticas / Rezensionen / Recenzoj

Jon Reyhner and Louise Lockard, editors. Indigenous Language Revitalization: Encouragement, Guidance and Lessons Learned
Reviewed by Robert N. St. Clair

Humberto López Morales (ed.). Enciclopedia del español en los Estados Unidos
Reviewed by Frank Nuessel

Carol A. Klee and Andrew Lynch. El español en contacto con otras lenguas
Reviewed by Frank Nuessel

Humphrey Tonkin. Una lingua e un popolo. Problemi attuali del movimento esperantista
Crítica per Federico Gobbo

Joan Costa Carreras (ed.). The Architect of Modern Catalan, Pompeu Fabra (1868–1948): Selected Writings
Reviewed by Frank Nuessel

Shouhui Zhao and Richard B. Baldauf, Jr. Planning Chinese Characters: Reaction, Evolution or Revolution?
Reviewed by Haitao Liu

Christo Moskovsky and Alan Libert. Essays on Natural and Artificial Languages
Reviewed by Federico Gobbo

Federico Gobbo. Fondamenti di interlinguistica ed esperantologia. Pianificazione linguistica e lingue pianificate
Reviewed by Haitao Liu

KIMURA Goro Christoph and WATANABE Katsuyoshi (ed.). Baikaigengoron o Manabuhito no tameni

Reviewed by Kiyoshi Naka

John Edwards. Language Diversity in the Classroom.

Reviewed by Timothy Reagan

La resumojn de ĉiuj kontribuoj el ĉiuj kajeroj de LPLP, kiuj ekde 1977 aperis ĉe Benjamins, oni trovas ĉe http://www.benjamins.com/cgi-bin/t_seriesview.cgi?series=lplp. Tie ankaŭ eblas serĉi laŭ aŭtoroj.

5.1.2 “European Journal of Language Policy” 2(2010) 1

En IPI 71 kaj 74 ni prezentis la enhavtabelojn de la du unuaj kajeroj de la nova eŭroptema lingvo-politika revuo. Sekvas nun la enhavo de la tria kajero (jare aperas du kajeroj):

Editorial

Michael Kelly

Articles

Approaches to fair linguistic communication

Sabine Fiedler

English as a foreign language in the EU: preliminary analysis of the difference in proficiency levels among the member states

Fernando D. Rubio and María Martínez Lirola

The impact of international cooperation on educational language policy: a case in Spain

Fouad Oukhiar

Rethinking early ESL Teaching in France: a cross-cultural approach

Michele Catroux and Annie Aries-Delage

Bologna: Speaking the common language of competences - a symbiosis between the competences of summary writing and the competences of translation

Susan Jeffrey

Official languages in the armed forces of multilingual countries: a comparative study

Jeffrey de Fourestier

Review

Karen M. Lauridsen and Daniel Toudic, Languages at Work in Europe: Festschrift in Honour of Professor Wolfgang Mackiewicz

Hanne Leth Andersen

Interventions

Faut-il parler anglais pour être européen ?

Jean Loup Cuisiniez

Résolution du Conseil relative à une stratégie européenne en faveur du multilinguisme
Michael Kelly

European Council conclusions on the education of children with a migrant background
Michael Kelly

L'Observatoire européen du plurilinguisme
Michael Kelly

Mercator Network
Michael Kelly

The European Bureau for Lesser-Used Languages
Michael Kelly

The Multilingual and Multicultural Classroom
Karen M. Lauridsen

New Special Interest Groups in CEL/ELC
Michael Kelly

5.2 Libroj pri lingvopolitiko

Nies, Fritz (2005, red.): *Europa denkt mehrsprachig. L'Europe pense en plusieurs langues.* Tübingen: Gunter Narr, 266 p., ISBN 3-8233-6109-0.

Stark, Franz (2007) : *Sprache – „Sanftes“ Machtinstrument in der globalen Konkurrenz. Wo, wie und wie weit wir Deutsch verteidigen sollten. Zehn Thesen für eine deutsche Sprachenpolitik.* Paderborn: IFB Verlag, 77 p., ISBN 978-3-931263-67-6.

Grobe, Myriam/ Petros, Dawit (2007, red.): *Eine Stimme für unsere Sprache. 10 Jahre Verein Deutsche Sprache.* Paderborn: IFB Verlag, 160 p., ISBN 978-3-931263-70-6.

Phillipson, Robert (2009): *Linguistic Imperialism Continued.* New York/London: Routledge, Taylor & Francis Group, 288 p. ISBN 978 0 4 15 87201 0.

Brûlé, Michel (2010): *Die ENgliche VerdrENgung. Anglaid – Eine Polemik aus Kanada über eine Herrschaftssprache.* Übersetzt aus dem Französischen von Kurt Gawlitta. Paderborn: IFB Verlag, 181 p., ISBN 978-3-931263-95-9.

Hanf, Dominik/ Malacek, Klaus/ Muir, Elise (2010, Eld.): *Langues et construction européenne.* Bruxelles usw. : Peter Lang, 286 p., ISBN 978-90-5201-594-1.

Hinrichs, Uwe (2010, red.): *Handbuch der Eurolinguistik.* Wiesbaden: Harrassowitz, 993 p., ISBN 978-3-447-05928-2.

6 Diversaj interlingvistikaj publikigaĵoj

6.1 Aktoj de GIL – kajero 17

Kiel sciante la germana Societo pri Interlingvistiko (Gesellschaft für Interlinguistik, GIL) ĉiujare eldonas la prelegojn de la antaŭjara konferenco en formo de aktoj. La enhavtabeloj de tiuj “Beihefte” al “Interlinguistische Informationen” (“Kromkajeroj” al la germanlingva bulteno de GIL, “Interlingvistikaj Informoj”) troviĝas en la reto: <http://www.interlinguistik-gil.de/beihefte.html> . La 17-a volumo kun la prelegoj de la 19-a konferenco de GIL en 2009 (ĉeftemo: “La rolo de personuloj en la historio de planlingvoj”) ĵus aperis:

Fiedler, Sabine (2010, Eld.): *Die Rolle von Persönlichkeiten in der Geschichte der Plansprachen. Beiträge der 19. Jahrestagung der Gesellschaft für Interlinguistik e.V., 27.-29. November 2009, in Berlin.* Interlinguistische Informationen, Beiheft 17. Berlin: Gesellschaft für Interlinguistik e.V. (GIL), 199 p., 15 EUR.

Enhavo

Sabine Fiedler *Vorwort* (Antaŭparolo)

Johannes Klare *André Martinet (1908-1999) – Ein bedeutender französischer Linguist und Interlinguist des 20. Jahrhunderts* (André Martinet [1908-1999] grava franca lingvisto kaj interlingvisto de la 20-a jarcento)

Jürgen Scharnhorst *Hans Jensen (1884-1973) – ein Leben für die Sprachwissenschaft* (Hans Jensen[1884-1973] – vivo por la lingvoscienco)

Detlev Blanke *Georg Friedrich Meier (1919-1992) und seine Rolle bei der Entwicklung der Interlinguistik in der DDR* (Georg Friedrich Meier [1919-1992] kaj lia rolo por la evoluigo de interlingvistiko en GDR)

Ilona Koutny *István Szerdahelyi (1924-1987) und sein Wirken für die Interlinguistik* (István Szerdahelyi [1924-1987] kaj lia agado por interlingvistiko)

Cornelia Mannewitz *Marr und Marrismus* (Marr kaj marismo)

Velimir Piškorec *Von Volapük zu Spelin. Zum Leben und Werk des kroatischen Plansprachlers Juraj (Georg) Bauer (1848-1900)* (De Volapuko al Spelin. Pri la vivo kaj verko de la kroata planlingvisto Juraj [Georg] Bauer [1848-1900])

Fritz Wollenberg *Adolf Schmidt – ein Pionier der Geophysik und des Esperanto als literarische Figur* (Adolf Schmidt – pioniro de geofiziko kaj de Esperanto kiel literatura figuro)

Sabine Fiedler *Zur Rolle des Muttersprachlers innerhalb und außerhalb der Esperanto-Sprachgemeinschaft* (Pri la rolo de denaskulo en kaj ekster la lingvo-komunumo de Esperanto)

André Müller *Künstliche Sprachen im Rahmen einer computergestützten lexiko-statistischen Untersuchung* (Artefaritaj lingvoj kadre de komputile farita leksiko-

statistika esploro)

Marek Blahuš *Zu einer Genealogie von Esperantisten nach dem Erlernen der Sprache* (Pri genealogio de esperantistoj post la lerno de la lingvo)

Sabine Fiedler *Neuere Fachliteratur 2009 zu interlinguistischen Themen* (Nova fakliteraturo 2009 pri interlingvistikaj temoj)

6.2 Novaj verkoj pri Zamenhof

Dum la lasta tempo aperis kelkaj gravaj verkoj pri Zamenhof (komparu ankaŭ la bibliografion de Humphrey Tonkin en IpI 71).

1 La ĝis nun **plej bonan biografion** de Zamenhof en **Esperanto** verkis la ruso Aleksander Korženkov³:

Korženkov, Aleksander (2009). *Homarano. La vivo, verkoj kaj ideoj de d-ro L.L. Zamenhof*. Kaliningrad: Sezonoj/ Kaunas: Litova Esperanto-Asocio, 319 p., ISBN 978-6099-5087-0-2. (Dua, plibonigita eldono devus aperi en 2011)

2 En la angla kaj en Esperanto aperis **konzigitaj eldonoj** de 1:

Korzhenkov, Aleksander (2010): *The Life of Zamenhof*. Translated by Ian M. Richmond. Edited by Humphrey Tonkin. New York: Mondial, 99 p., ISBN 978-1-59569-167-5.

Korženkov, Aleksander (2010): *Zamenhof. Biografia skizo*. Kaliningrad: Sezonoj/ Kaunas: Litova Esperanto-Asocio, 61 p., ISBN 978-609-95087-3-3.

3 Korženkov ankaŭ kompilis kolekton de **originalaj tekstoj** de Zamenhof pri filozofiaj kaj ideologiaj demandoj:

L.L. Zamenhof (2006): *Mi estas homo. Originalaj verkoj de d-ro L.L. Zamenhof*. Eldonis Aleksander Korženkov. Kaliningrad: Sezonoj, 287 p.

4 Kaj fine Korženkov verkis artikolon pri la problemoj de la esplorado de la vivo de Zamenhof (= "**zamenhofologio**“):

Korženkov, Aleksander (2010): *Zamenhofologio. Aktualaj problemoj kaj taskoj*. Kaliningrad: Sezonoj, 16 p.

5 La unua **ampleksa germana biografio** de Zamenhof antaŭ nelonge aperis en germana prestiĝa scienca eldonejo:

Künzli, Andreas (2010): *L.L. Zamenhof (1859-1917). Esperanto, Hillelismus (Homaranismus) und die „jüdische Frage“ in Ost- und Westeuropa*. (Serie Jüdische Kultur Bd. 23). Wiesbaden: Harrassowitz, 527 p. kun 24 p. bildtabuloj, ISBN 978-3-447-06232-9, 98 €.

³ La malsama skribmaniero de la nomo de la rusa aŭtoro devenas de la malsamaj lingvaj eldonoj.

6 En la jaro 2009 en La Chaux-de-Fonds okazis **simpozio pri la idearo de L.L. Zamenhof**. La sekva volumo entenas la prezentitajn prelegojn:

Nilsson, Bertil (2010, red.): “Homarane”. *Kajero en Esperanto pri socio, filozofio kaj religio*. Jaro 1, numero 1, januaro 2010, 213 p.

Oni krome povas mencii:

7 Romaniuk, Zbigniew/ Wiśniewski, Przemysław (2009): *Ĉio komenciĝis ĉe la Verda. Pri Ludoviko Zamenhof, lia familio kaj la komenco de Esperanto*. (En Esperanto kaj la pola): Łódź: Koliński, 50p. + 50 p.

8 Minnaja, Carlo (2009): *Le grandi personalità dell' UNESCO Lazzaro Ludovico Zamenhof*. Antologia. Milano: Federazione Esperantista Italiana, 301 p., ISBN 978-88-96582-00-8.

6.3 Monumenta bibliografio de periodaĵoj en aŭ pri Esperanto

Aperis vere monumenta, ja unika verko kun netaksebla valoro por esperantologiaj esploroj:

Luis Hernández Yzal/ Árpád Máthé/ Anna Maria Molera (2010): Bibliografio de periodaĵoj en aŭ pri Esperanto. Vol. I. (In memoriam Luis M. Hernández Yzal). Budapeŝto: Bibliografia Fondaĵo Luis M. Hernández Yzal. XX p +1155 p., ISBN 978-963-06-3926-2.

Krom la ampleksega bibliografio en la libro enestas:

- “Laŭdacio por Luis M. Hernández Yzal (foto, biografiaj detaloj pri lia vivo, informojn pri la Hispana Esperanto-Muzeo, nekrologoj kaj omaĝaj vortoj)
- Antaŭparoloj en la lingvoj Esperanto, angla, germana, franca, hispana, hungara, katalana.

Kun afabla permeso de d-ro Árpád Máthé ni reproduktas la esperantlingvan antaŭparolon:

PREFACO

En la vivo de nia jam 120-jara internacia kultura movado ĉiam havis gravan rolon la periodaĵoj. Tiuj periode aperantaj publikigaĵoj unuflanke certigis la nepre necesan informan kontakton inter la anoj de la diaspora komunumo de la esperantistoj, aliflanke — en formo de nacilingvaj artikoloj aŭ periodaĵoj — plenumis la ĉiam aktualan kaj gravan varban rolon.

Niaj pioniroj — *Joan Amades Gelats, Petro Stojan, József Takács kaj Paul Tarnów* — per siaj katalogoj kaj bibliografioj aperintaj en la unuaj kvindek jaroj de Esperanto prezentis kaj priskribis la tiutempajn periodaĵojn en aŭ pri Esperanto. En la postaj jardekoj historiistoj kaj esploristoj de la movado en formo de artikoloj en diversaj periodaĵoj aŭ libroj aperigis plurajn studojn. Samtempe dise en la mondo fondiĝis gravaj instituciaj kaj privataj bibliotekoj, kies katalogoj kaj diversaj interŝanĝaj aŭ brokantaĵaj listoj necesigis la kompilon de nova bibliografio de la Esperanto-periodaĵoj.

Tiucele la pioniran laboron faris *Luis Hernández Yzal kaj Ramon Molera* per aperigo en "Kolektado" 1979/2 informojn pri la A-literaj esperanto-periodaĵoj. Post la bedaŭrinda morto

de *Ramon Molera*, en la jubilea jaro de Esperanto *Luis Hernández Yzal*, direktoro de la Hispana Esperanto Muzeo, iniciatis fondon de bibliografia esplorgupo "Rondo Takács". La tripersona teamo kunredaktis kaj eldonis inter 1993—1995 la ĉiumonatan bibliografian organon "Periodaĵoj". Tie aperis katalogo de pli ol 10 mil periodaĵoj en aŭ pri Esperanto, kun la minimumaj informoj (titolo, eldonloko kaj aperdaŭro).

Antaŭ kvin jaroj la iniciatinto kaj gvidanto de Rondo Takács forpasis. Memore al li — dank' al liaj familianoj kaj tiuj de la kunlaborantoj — kreiĝis kadre de Universala Esperanto-Asocio "Bibliografia Fondaĵo Luis Hernández Yzal". Tiu ĉi unua volumo de la bibliografio pli amplekse traktas pli ol 12 mil periodaĵojn, menciante inter aliaj ankaŭ ties redaktorojn kaj aliajn kunlaborantojn, krome iliajn bibliotekajn kodojn en Internacia Esperanto Muzeo en Vieno (IEMW) kaj Germana Esperanto-Biblioteko Aalen (GEBAA). La dua volumo aperonta en 2008⁴ enhavos indkson de la redaktararo, kunlaborantaro kaj tiun de la eldonlokoj.

La kunredaktoroj: dr. Árpád Máthé kaj Ana Maria Molera

7 Forpasis Jaromír Jermář (1922-2010)

Jaromír Jermář, naskiĝinta la 10-an de julio 1922 en Frenštát pod Radhoštěm, estis ĉeĥa sociologo, doktoro, eksprezidanto de ĈEA kaj de la Ĉeĥoslovaka Esperanto-Komitato.

Ĝis la jaro 1938 (ĝis la anekso de la ĉeĥoslovaka limregiono fare de germanoj) li vivis en Opava. Li abiturientiĝis en la realgimnazio en Prago en 1941 kaj en la komerca akademio en Zlín en 1944. En la jaro 1953 li akiris la doktoriĝon de filozofio en la Karola universitato en Prago, krome fariĝis kandidato de filozofiaj sciencoj en 1964. Li havis diversajn laboristajn kaj administrajn okupojn. En la jaroj 1954 - 1985 (ĝis sia emeritiĝo) li agadis kiel scienca laborulo. Li koncentriĝis ĉefe al la problemaro de etnaj interrilatoj. Jaromír Jermář ofte partoprenis interlingvistikajn aranĝojn, prelegis kaj diskutis. Li forpasis la 10-an de oktobro 2010.

(Parte laŭ http://eo.wikipedia.org/wiki/Jarom%C3%ADr_Jerm%C3%A1r)

La forpasinto ne multe publikigis en Esperanto:

Jermář, Jaromír (1979): "Etnaj problemoj kaj interlingvistiko". En: Detlev Blanke (Eld.): Esperanto. La internacia lingvo - sciencaj aspektoj. Berlin: Kulturbund der DDR (Centra Laborrondo Esperanto) [237 p.], p. 65-71.

(La supra teksto estis represita en: István Szerdahelyi [1980, Eld.]: *Miscellanea interlinguistica*. Budapest: Tankönyvkiadó, p. 185-191.

Jermář, Jaromír (1986): "Dialogo pri komunikado". En: *Paco*, ĉeĥoslovakia eldono, p. 2-3

Eldonas: Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED) ĉe Universala Esperanto-Asocio (UEA), Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. www.esperantic.org. ISSN 1385-2191. Redaktas: Detlev Blanke, Otto-Nagel-Str. 110, DE-12683 Berlin, tel.:+ 49-30-54 12 6 33, fakso:+ 49-30-54 98 16 38, detlev@blanke-info.de. Mendu nur ĉe UEA. Kontribuojn sendu nur al la redaktoro, per retroŝto aŭ KD. Artikoloj sen aparta indiko pri aŭtoreco kutime estas de la redaktoro. Represo kun fontindiko estas permesata. Bv. sendi pruv-ekzempleron. Oni ĉefe bibliografias viditajn materialojn. Kunlaborantoj el ĉiuj mondaj regionoj bonvenaj. Fakuloj ricevas Ipl senpage laŭpete de UEA.

⁴ La laboro pri la bibliografiego montriĝis multe pli komplika kaj temporaba ol antaŭvidite, kiel montras la jardindiko – Red.